MONATA ORGANO DE OOMOTO KAJ U.H.A. ★

Oomoto

1966

Jan-Feb.

28-a Jaro N-ro 307-308 Administracio: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo.

Por Vera Paco

Hidemaru Deguĉi

Kiom eble plej multe donu al aliaj, kion ili bezonas. Krom tio ekzistas neniu alia rimedo, per kiu oni povas fari la mondon paca.

Neniam perfortu aliajn. Decas, ke vi gvidu kaj konduku ilin en veran komprenon. Ĉia armilo, en la esenco de si mem, signifas perforti.

Neniu provo estas tiel miopa kiel la provo eĉ momente subpremi ideologion per fortoj. Kio povas korekti aŭ konduki ĝin al la ĝusta vojo estas nur alia ideologio.

Oni neniam povas venigi la veran pacon per ia subpremado aŭ iaj konspiroj. Ĉio estos vana tiel longe ĝis la homoj, komprenante unuj la aliajn kaj cedante al si reciproke, atingos, ke ili plu lasas en la koro nenian ombron da plendoj aŭ malkontentoj.

Ĉiuj individuoj estas komunaj kaj samtempe diferencaj. Lasi ilin mem manifesti siajn karakterizajn ecojn, jen estas la Dia volo. La mondo estas tiel kreita, ke, se ĉiu el ili plene manifestos kaj evoluigos sin, ĉio bone iros. Sed, ĉar la homoj ne plene manifestas sin kaj vivas kiel ne aldecas al ili, tumulto neniam ĉesas en la mondo.

Kio ebligas al ĉiu, ke li estu tia, kia estas lia naturo, kaj fariĝu tia, kia li fariĝos laŭ sia naturo, tio estas vera religio.

Trad. T. Nakamura

Benedicto Silva

LA LIBRO DE TEO*

Ju pli multe oni konvinkiĝas, ke la literaturo estas la plej spirita el la Artoj, des pli facile oni povas konstati, ke literatura verko estas la plej fidela kaj fidinda manifestiĝo de la spirito de ĉiu popolo. Efektive, ĉiuj plej elstaraj kaj specifaj karakterizaĵoj de unu popolo evidentiĝas en ĝiaj plej gravaj literaturaĵoj. Sekve, se oni deziras koni la psikologion de unu popolo, kun ĉiuj ĝiaj nuancoj, sufiĉas ke oni tralegu ĝiajn plej signifajn verkojn. En ili estas kvazaŭ gravuritaj la ĉefaj trajtoj, kiuj karakterizas la popolon, en kies sino ili estas kreitaj.

Tion oni povas diri ankaŭ pri la literatura verko rilate la epokon, en kiu ĝi estis kreita. Same kiel ĝi respegulas la psikologion de unu popolo, tiel same ĝi povas reprezenti la spiriton de sia epoko.

Kiel sciate, literaturo ne estas simpla amuzaĵo de rafinita spirito. Ĝi estas — kaj pri tio oni ne povas dubi —, ĝi estas frukto de serioza laboro en preciza momento de la vivo de la artisto, laboro neniel prokrastebla, "fatala".

La verkisto, kiel la ceteraj artistoj, aperas kvazaŭ antaŭdestinita por sia grava misio. Li estas mem la misiisto, komisiita por efektivigi la grandan kaj gravan verkon, kiun neniu alia, antaŭ aŭ post li, povis aŭ povos realigi. Forto mistera kaj magia faras lin diferenca kaj supera ol liaj fratoj kaj sampatrujanoj. Nur tiaj homoj sukcesas enviciĝi en la granda aro de la talentaj artistoj, kiujn la Homaro jam produktis. Homero, Vergilio, Dante Alighieri, Shakespeare, Milton, Cervantes, Camões, Goethe, Tolstoj kaj multaj aliaj diskonigis trans la baroj de siaj respektivaj landoj, lingvoj kaj kulturoj la spiriton de siaj popoloj, en formo de beletraj verkoj kreitaj por la eterneco. Resume, tiuj verkoj estas sublimaj kaj fidelaj mesaĝoj de unu popolo al la ceteraj de la Tero, de unu kulturo al ĉiuj ceteraj kulturoj de nia mondo, fine, mesaĝo de la estanteco al la sinsekvaj generacioj aperontaj tra la jarmiloj.

Tiujn pensojn inspiris al mi la legado de la luksa eldono de LA LIBRO DE TEO*, de Okakura

* "La Libro de Teo", de Okakura Kakuzo, trad. de T. Nakamura, eld. de KOSMO, Osaka, Japanujo, 1965.

POLSKI

Kakuzo, majstre tradukita, en Esperanton, de s-ro Tazuo Nakamura. Reprezentativa verko de la Japana Literaturo, ĝi tamen fariĝas konata internacie nur nuntempe, dank' al la Esperanta traduko, 60 jarojn post sia originala eldono en la angla lingvo.

*

Malfacile estis, dum la legado de tiu majstroverko, difini, ĉu ĝi temas pri simpla disertacio pri Filozofio, Moralo aŭ Etiko, aŭ ĉu ĝi estas nur beletra verko, sen alia pli alta intenco. Al mi, tamen, ĝi montriĝis samtempe kiel fajna, ĉarma elmontraĵo de Filozofio, Moralo kaj Etiko, ĉio aranĝita kun plej alta konscio de estetikismo, kio faras la libron plej perfekta artverko en la vera senco de tiu ĉi vorto. Kaj oni ne eraras, se oni diras, ke ĝi estas esence kaj super ĉio poezia verko !

Kiel ĉiuj eminentaj verkoj, LA LIBRO DE TEO respegulas la veran spiriton de la japana popolo, precipe kaj ĝuste en tio, kion tiu popolo havas plej karakteriza : la konvinko, ke ilia konduto estas rekta kaj ideala, kun rilato al la ceteraj popoloj de la Tero, kaj precipe rilate al la Okcidentanoj, speciale. Sub tiu aspekto, la Aŭtoro sukcesis fariĝi tiel severa, tiel rigora kiel ĉiuj Japanoj. Kaj tio estas bela kaj sublima, ĝis certa grado, al kelkaj Okcidentanoj saturitaj de la jam eluzita kulturo de Okcidento, kie la homa valoro kaj vivkoncepto jam multe dekadencis. Fakte, en multaj rilatoj la Okcidenta kulturo estas "sen teeco", por uzi tre karakterizan esprimon de la Teoistoj. Certe mankas al la senarta vivo de Okcidento iom da Teoismo, kiu "inokulus purecon kaj harmonion, la misteron de reciproka karitato, la romantikon de la socia ordo" (pĝ. 3) en ĝin.

En la unua ĉapitro de tiu verko, nome, *La Taso de Humaneco*, kuŝas interalie la plendoj (aŭ indigno ?) de la Oriento kontraŭ la miskompreno de Okcidento rilate la vivmanierojn, vivkonceptojn kaj gustojn de la Japanoj. La Okcidento "kvazaŭ" ignoras la japanan Arton de Vivo prezentitan de Teoismo, por komenti ilian Kodon de Samurajo. Kaj aliflanke la Oriento, rekompence, "konsideradis vin (la Okcidentanojn) la plej malpraktika popolo sur la tero, ĉar, oni diris, vi predikas kion vi neniam praktikis" (pĝ. 8).

Ĉu rajtas plendi (aŭ indigni) la Aŭtoro, aŭ ĉion tion naskas sole nur subtilaj vidpunktoj ?

Iel ajn, en tiu tono la Aŭtoro faras la apologion de la Kulto de Teo, priskribas ĝian historian evoluon en Ĉinujo kaj poste, en la dek-kvina jarcento, en Japanujo, tiamaniere, ke la leganto povu senti ĝian gravecon

en la socia kaj kultura vivo de la Japanoj.

Antaŭ ol fermi post si la imponan portikon de tiu grandioza verko, tio estas, la unuan ĉapitron titolitan *La Taso de Humaneco*, la leganto devas mediti pri diraĵoj, kiel la jenaj : "La mondo palpadas en la ombro de la egoismo kaj vulgareco. Scio estas aĉetata per malbona konscienco, bonfaro praktikata por utileco. La Oriento kaj la Okcidento, kvazaŭ du drakoj ĵetitaj en la maron de tumulto, vane strebas regajni la juvelon de la vivo. Ni bezonas iun Nukuon por ree ripari la vastegan ruinaĵon ; ni atendas grandan Avataron. Dume, ni prenu sorbeton de teo" (pĝ. 16). "Ni sonĝu pri la forpasemo, kaj pasumu en la bela stulteco de aferoj" (pĝ. 17).

Ĉu pesimisma poeziemo de seniluziiĝinto, ĉu amara filozofio de skeptikulo, ni ne povas ne pensi alie ol la Aŭtoro, kiam, strebante akceli la starigon de la sopirata tutmonda paco, ni spektas la teruran reciprokan ekstermiĝadon de la homoj : Oriento kontraŭ Okcidento, lando kontraŭ lando, provinco kontraŭ provinco, urbo kontraŭ urbo, familio kontraŭ familio kaj frato kontraŭ frato !

Cetere, "En la adorado de Bakko ni oferis tro senbride ; kaj ni eĉ transfiguris Marson en gloran bildon" (pĝ. 5).

Post longa, alloga priskribado de la Skoloj de Teo kaj interesa skizo de Taoismo kaj Zenismo, en la dua kaj tria ĉapitroj, respektive, la Aŭtoro alvenas al la kvara, titolita TE-ĈAMBRO, en kiu li lerte priskribas la arkitekturon, la dekoraciarton, entute, la artisman aranĝon de la teĉambro, kun ĉiuj ĝiaj partoj, zorgeme menciante grandon, specojn de lignoj uzataj en ĝia konstruado, la partojn ĝin konsistigantajn, dekoracion, ktp.

Tre kurioza estas, sendube, precipe por la Okcidentano, la manko de simetrieco de la dekoracia skemo de Teoismo, kaj ankaŭ la timo de ripeto konstante premanta en la teĉambro. Ĝuste tio plej ŝokas la Okcidentanon kutimiĝintan al la terura monotoneco de simetrio, ekvilibro, ripeto kaj kombino de formoj kaj koloroj precipe en la dekoraciarto kaj arkitekturo.

Tiun ĉi ĉapitron la Aŭtoro finas per tiuj ĉi vortoj : "Nuntempe, industriismo faras la veran rafinecon pli kaj pli malfacila tra la mondo. Ĉu ni ne bezonas la teĉambron nun pli ol iam antaŭe ? " (pĝ. 73). Malĝoje, ankaŭ ni Okcidentanoj plendas pri tiu terura realaĵo... Kiom da tradicioj ni jam forlasis !

Antaŭ ol veni al la sepa kaj lasta ĉapitro de la ĉarma libreto, nome, *Temajstroj*, kiun la Okcidentano

mem ne povas legi ne sentante sin dolĉe altirita al la agrabla regno de la Poezio kaj Idealo, la Aŭtoro kondukas la leganton al la plej supera sfero de la Estetika Belo, tie oferante al lia spirito plej delikatajn paĝojn nur tre malofte konceptitajn de la homa genio. Temas pri la kvina kaj sesa ĉapitroj de tiu verko, respektive : *Artaprecado* kaj *Floroj*.

Kion diri pri artaprecado ?

Tiel abstrakta afero postulus de nesperta homo pli abstraktan disertacion, kiu nenion klarigus. En ĉarmaj paĝoj, sin montrante eminenta stilisto kaj mastro de ĉiuj lingvaj kaj literaturaj rimedoj, la Aŭtoro kreas senkomparan majstroverkon, kiam li disertas pri tiu temo.

"Ĉu vi iam aŭdis la Taoistan rakonton pri la Dresado de la Harpo ? "

Kaj li prezentas la belan rakonton, per kiu li majstre kondukas la leganton, kvazaŭ sur la mildaj flugiloj de la Poezio, al la kompreno de la mistero de artaprecado, kapablo per kiu ne ĉiu homo estas dotita. El la rakonto li deduktas, ke "Majstroverko estas ia simfonio ludata sur niaj plej delikataj sentoj. Vera arto estas Paija, kaj ni la harpo de Lungmen. Ĉe la magia ektuŝado al la bela, la sekretaj kordoj de nia estaĵo vekiĝas, ni vibras kaj ĝojtremas responde al ĝia voko. Koro parolas al koro. Ni aŭskultas la nediritan, ni fikse rigardas la nevideblan". Pli poste : "La majstroverko dependas de ni mem, kiel ni dependas de la majstroverko" (pĝ. 78). Kaj li daŭrigas siajn altpensajn konsiderojn pri artaprecado, prezentante tie ĉi kaj tie asertojn de eternaj valideco kaj vereco. "Nenio estas pli sankta ol la unuiĝo de la parencaj spiritoj en la arto. En la momento de renkontiĝo, la artamanto transcendas sin. Li samfoje estas kaj ne-estas" (pĝ. 81).

Miaopinie, tamen, lia plej alta flugo en la transcenda sfero de la Poezio estas en la sesa ĉapitro titolita *Floroj*. Eterna kaj universala kiel la Poezio kaj Muziko — artoj kiujn oni apenaŭ povas aŭ tute ne povas distingi pro la identeco mem de sia esenco—, tiu ĉapitro estas poemo de rara beleco. Ĝin oni legas sentante la mildan, agrablan parfumon de la floroj, kvazaŭ oni promenus, en freŝa kaj

* **El Japana Literaturo**

A-5 266 p. ¥ 1,600

21 verkoj el moderna japana literaturo

* **Nia Korpo** (reviziita)

A-5 108 p. ¥ 650

Anatomio kaj fiziologio por laikoj

malvarmeta printempa mateno, tra la pasejoj de kolorriĉa florĝardeno, sed gvidata de saĝa kaj sankta Orienta Flormajstro. Poemo riĉa de belaj figuroj kaj plena de plendoj kontraŭ la barbareco de la primitiva homo de ĉiuj epokoj, antikvaj kaj modernaj, kies sovaĝeco kaj krueleco neniam ŝparis la sendefendajn estaĵojn. "Kial la floroj estas naskitaj tiel belaj kaj tamen tiel malfeliĉaj?" (pĝ. 94). Kiu respondus? "Ve! La sola floro konata kiel flugilhava estas la papilio: ĉiuj aliaj staras senhelpaj antaŭ la detruanto" (pĝ. 94).

Malĝoje ni devas rekoni, ke la floroj ne plu ravas la fieran homon de la nuntempo. Ilin admiras, en sia poezia naiveco, nur la infanoj kaj la homoj "malriĉaj en spirito"... Floroj, steloj kaj infanoj iam inspiris poetojn kaj sentemajn homojn. Ne hodiaŭ. Nun la homo supreniris tre alten, sur la piedestalon de la gloro, fiero kaj scio, tiamaniere, ke ne decas, ke li okupiĝu pri tiaj bagatelaj aferoj... Cetere, ekkaptas lin, en tiu ĉi momento de rafinita civilizacio kaj moderno, kiam li juĝas sin mastro de la spaco kaj de ĉiuj ĝiaj misteroj, — ekkaptas lin nur la Scienco! Eĉ en la Scienco li kredas trovi inspiron por sia malvarma kaj senkolora pensado, kiun ofte li emas nomi poezio. Kiam li decidas mallevi la okulojn al la tero lin ĉirkaŭanta, li vidas nur monon, sekson, socian pozicion kaj reputacion. Nur tio ebriigas la homon de la nuntempo, fiera pri si mem. Tial, se ne en la tuta mondo (kion mi nur malfacile povas kredi), almenaŭ en la Nova Mondo la literaturo kaj ĉiuj aliaj formoj de Arto, estas saturitaj de mono, sekso kaj, sekve, de perfido, malamo, sango kaj krimo.

La floroj, en sia simpla ĉarmo, jam ne plu ravas la homon... Kaj ĉu ili iam ricevis almenaŭ kompaton, se ne amon de la homo? Kie? Ĉu en Okcidento? Ĉu en Oriento?

"Floroj, se vi estus en la lando de la Mikado, vi foje trafus teruran personon armitan per tondilo kaj segileto. Li nomus sin Majstro de Floroj" (pĝ. 92).

"Ĉu vi ne estus preferinta, ke vi estu tuj mortigita kiam vi estis unue kaptita? Kiaj estis la krimoj, kiujn vi devas esti farintaj dum via pasinta enkarneco, ke vi laŭrajtigas tian punon kiel ĉi tiu?" (pĝ. 93).

La floroj estas la poezio de la tero. Sen ili, kiel aspektus nia mizera mondo? La printempo ne estus parfuma, nek la birdoj eligus siajn kantojn en tristaj, senkoloraj matenoj. Ne kantus tiel bele la fontoj, nek la geamantoj trovus en la sino de la naturo la lingvon de la koro. Kaj "je ĝojo kaj malĝojo, la floroj estas niaj konstantaj amikoj..." (pĝ. 90).

Sed, "Diru al mi, ĝentilaj floroj, larmogutoj de la steloj, starantaj en la ĝardeno, balancantaj la kapon al la abeloj, — kantante pri la roso kaj sunradioj, ĉu vi scias la teruran baton, kiu atendas vin ?" (pĝ. 91).

Ne, sole nur la homoj scias ĝin !

La filozofia kerno de LA LIBRO DE TEO, tamen, troviĝas en *Taoismo kaj Zenismo*, la tria ĉapitro de tiu libro. Ĝin la Aŭtoro komencas objektive : "La kunligeco de Zenismo kun la teo estas proverba. Ni jam rimarkis, ke la ĉanojo estas elvolviĝo de la Zenrito". Kaj tra la tuta interesa ĉapitro la leganto trovas la eniron en tiun belan ĝardenon konceptitan de la Orienta spirito, tra nuboj de la aroma kaj subtila fumo de tasoj da teo !

*

Tiujn, kaj milojn da aliaj pensoj LA LIBRO DE TEO inspiras al la leganto. Ne gravas, ke tiu leganto estas Japano aŭ ne-Japano, Orientano aŭ Okcidentano. Ĝi estas vera majstroverko de la Homaro pro la universaleco de sia enhavo. La plenecon de tiu universaleco, tamen, ĝi atingis nun, en sia Esperanta vesto majstre teksita de s-ro Tazuo Nakamura, vera artisto de la malfacila tradukarto kaj unu el la plej eminentaj esperantistoj de la nuna fazo de nia literaturo.

Traduko estas reverkado, kaj por ĝin plenumi kontentige, sen perfidi la aŭtoron kaj la verkon, necese estas, ke la tradukonto unue strebu plene asimili ne nur la enhavon de la tradukota libro, sed ankaŭ ĝian spiriton, plurfoje kaŝitan en la plej subtilaj frazkonstruoj ; poste, ke li reverku ĝin en lingvaĵo freŝa, natura kiel tiu de la originalo. Kvankam mi ne konas la originalon de LA LIBRO DE TEO, mi povas diri, ke nur malfacile la lingvaĵo tiea povas esti tiu de la traduko, laŭ flueco, eleganteco kaj klareco.

Ne validas, do, por s-ro Tazuo Nakamura, la aserto, ke "Traduko ĉiam estas perfido" (pĝ. 36).

*

Kreaĵo de vera "aristokrato de la gusto", LA LIBRO DE TEO estas perfekta artverko, destinita ĝisvivi la eternecon, kiel ĉiuj grandaj kreaĵoj de la spirito.

* **Volvotigo de Amikeco**

A-5 90 p. ¥ 750
Biologiaj eseoj
kaj humanaj temoj

* **Japana Kvodlibeto**

B-6 127 p. ¥ 480
Originaloj
de japanaj esperantistoj

J. R. Banham

Esperanto : ĉu facila ? Kiomlonga lernado ?

Jen pli-malpli aŭtentaj ekzemploj de homoj, kiuj faris rimarkindan laboron en Esperanto, lerninte ĝin en tre mallonga tempo :

GILES DIXEY (1933) tradukis la dekan libron de la Odiseado de Homero en monato, post duhora studado de Esperanto. Kio poste fariĝis kun tiu "geniulo" ?

George Cox Esperantiĝis en 1905, *66*-jaraĝa ; en 1906 li estis ano de la redakta komitato de "The British Esperantist" kaj proprakoste eldonis en tiu jaro sian 371-paĝan Komentarion kaj Gramatikon de Esperanto. Li tradukis plurajn librojn de la Nova Testamento kaj tri rakontojn el la "Mil kaj Unu Noktoj". Li mortis en 1909.

A. E. Styler en 1913 gajnis la Prezidantan Premion per sia "En la Montoj", post nur dumonata studo de Esperanto. Garantias tion B. Mudie, la tiama prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio. En Majo 1914 aperis lia senrima traduko de "In Memoriam" (Tennyson). Post tiam. . . silento. Li mortis 1928.

D-ro Vallienne Esperantiĝis en 1903 ; en 1904 li jam publikigis en Esperanto la du unuajn kantojn de la Eneido de Virgilo.

Leo Belmont skribis sian faman kaj relative bonstilan leteron al Zamenhof en la jaro 1887 post la nasko de Esperanto.

*

La aserto de D-rino Guglielminetti en "Memorlibro", p. 69, ". . .valoras la penon fordoni la dek- dekdu horojn, kiujn postulas la lernado de la Internacia Lingvo. . ." sekvas similajn ĉe : Fudamenta Krestomatio, 234 (17a eldono). . . "(por homo iomete klera) por ĝia lernado sufiĉas kelke da tagoj". P. 271 : "ili (homoj neinstruitaj) ellernis tiun ĉi lingvon en la daŭro de iaj kelke da semajnoj, dum la ellernado de ia lingvo natura ĉe tiuj samaj personoj devus okupi almenaŭ 4 aŭ 5 jarojn". P. 276 : "lingvo arta estas almenaŭ 50 fojojn (legu : kvindekoble) pli facila ol natura. En tio estas nenia trograndigo".

Rimarku la nekonsekvencecon de la konjektitaj komparoj. Cetere Zamenhof supozinde havis en penso nur Eŭropanojn.

P. Stojan en "Deveno kaj Vivo de Esperanto" (1953) skribis, ke li akiris "scion" de Esperanto nur post du jaroj, malgraŭ scio de la Greka, Latina, Franca, iom Germana, sur sia patralingva fundo.

En 1922 Ĉino *Ken* diris : "Ĉino bezonas nur du jarojn por lerni Esp-

eranton, dum por aliaj lingvoj necesas 6 por la Angla, 7 por la Franca, 8 por la Germana". "British Esperantist", Marto, 1942 : "La lingvo-fakulo trovos, ke, kvankam la kapablo legi la lingvon venos post kelkaj semajnoj, aŭ eĉ tagoj, Esperanto estas sufiĉe granda, por lin okupi dum la tuta vivo".

J. Grum en "Pola Esperantisto" 3/4 1965 iom tro modeste pretendas nur ke, kompare kun la naciaj lingvoj, la lernado de Esperanto estas *ĝis duone* mallongita per siaj 16 reguloj gramatikaj kaj per sia afiksa sistemo...

H. W. Holmes en "International Language", Aprilo 1930, citas Germanan bankiston : "La Angla — sep jaroj da pena laboro. Esperanto — sep monatoj, post kio mi havis scion de ĝi, kian mi tute ne povis esperi pri la Angla". Holmes rimarkas, ke estas elstaraj individuoj, kiuj lernas Esperanton en kelke da tagoj aŭ semajnoj, sed inter tiuj ne multaj Angloj. Li nomas : 18 monatoj da libertempa studo, kio donas al kelkaj homoj ekzamenan honoron, parole kaj skribe, ĉe la Supera Diplomo de la Londona Komerca Ĉambro. Pro la afiksoj, Esperanto vortprovize estas "akirebla dekfoje pli facile ol ĉe natura lingvo".

G. J. Cox en "British Espsperantist", Junio 1913 : "Homo kun meza inteligento povas lerni la prononcon en horkvarono ; ne sciante alian lingvon ol la patra, kaj studante po horduono en ĉiu tago, li povas lerni Esperanton en tri monatoj".

*

Mia propra atesto estas, ke post 40 jaroj mi ankoraŭ "lernas Esperanton", ĉiusemajne alkonkerinte novan terenon en la prilingva tereno. Miaopinie necesas, ĉe inteligenta Eŭropano, minimume 6 monatoj da konscienca studado, por povi ĝin legi kaj skribi sufiĉe bone, kaj eble jaro, por ĝin paroli senerare kaj flue. Ĉu inteligentaj geknaboj povus tion fari en tiu tempo, jen demando, kiun nur longa instruista sperto povus respondi.

Regas konfuzo ĉe la terminoj. Multe dependas de la kriterioj. Ĉu oni celas al simple ĉiutaga uzado kaj elementa legado ; aŭ al ĉiutemaĵa parolado kaj literatura legŝato ? Ĉu pri demandoj pri la kieo de la plej proksima stacidomo aŭ pri oratora prezento de serioza temo ? Ĉu pri legado de "Karlo" aŭ de "Kvaropo" ?

* **Japanujo Hieraŭ kaj Hodiaŭ**

A-5 40 p. ¥ 120

Informoj bele kaj abunde ilustritaj

* **Japanaj Malnovaj Rakontoj**

B-6 127 p. ¥ 340

Ankaŭ koloraj bildoj kontribuas

(b) Kiom da horoj en ĉiu semajno oni dediĉas al studado? Ĉu intensa aŭ nur distra? Kiom da honeste pena skribekzercado kaj kiom da nur revema legaĉado de ne bone komprenata teksto?

(c) La lingvolernema inklino kaj kapablo de la studanto, plus ĝenerala inteligento. Krome, la faktoro de lingva parenceco. Anoj de ne-Arja (ne-hindoeŭropa) lingvo, ekz., Finna, Hungara, Turka kaj la Aziaj, trovas Esperanton pli malfacila ol ekzemple Franco, Anglo, Germano. (vidu paragrafon suban).

Pro la diversaj faktoroj, personaj kaj cirkonstancaj, la tuta demando ŝajnas akademieca, ne laŭscienca. Iu homo sufiĉe bone lernis Esperanton dum vojaĝo al Mondkongreso, por ĝin uzi tie. Tiaj personoj sidas en la mirinda kategorio de la Zamenhofa aserto supra. Verdire, ekzistas tre-talentuloj, kiuj *praktike* ekposedas la lingvon post kelktaga studo, sed ni devas konstati pri ĝenerala normo. Certe estas malsaĝe, kaj malvere, vidigi Esperanton kiel facile akiratan ludilon.

Unu fakto estas klare evidenta: ke neniu homo *plene* posedas Esperanton. Ju pli li akiras scion pri ĝi, des pli li sentas la kono-kampon larĝiĝi. Postulus jarojn da laboro, klasifiki milojn da esprimoj, vortoj kaj frazturniĝoj, kiujn uzis frutempe Zamen hof, sed poste forrifuzis aŭ ŝanĝis. Ofte li skribis nekonsekvence, ekzemple: "Li faris sian ekzamenon" (Fabeloj de Andersen, vol. I, 44; "Li faris sian ekzameniĝon", p. 134.

Ankoraŭ longan tempon oni teorie cerbumos pri nia enigmo. Finfine, kiam Esperanto estos instruata lerneje, ĝenerale, oni povos definitive revizii la "Enketo pri internacia Helplingvo" de Pierre Bovet (1948), ĝis nun la plej helpa kontribuo al solvo de la problemo.

*

Malgraŭ ke Esperanto estas vortare kaj idiomaĵe parenca al la Eŭropaj lingvoj ĉefaj, laŭ sia interna strukturo kaj aglutineco ĝi similas al iaj lingvoj ekster-Eŭropaj, Vidu: Aglutina Karaktero de Esperanto, Ekster-eŭropa Karaktero... (Esperanta Enciklopedio); A.B.C. de Esperanto (Waringhien); "Esperanto", II/56, p. 174; "Norda Prismo", N-ro I, 1959; "Skizoj pri Teorio de Esperanto" (Drezen) 1931, "Elektitaj Prelegoj" (Collinson pri Lingva Strukturo); "Esperantista" (Praha) p. 66, Nov, 1949, artikolo de Karolo Piĉ).

La Libro de Teo 2.50 us. dol. aŭ 9 ned. gld.

Enciklopedieto Japana 5 us. dol. aŭ 18 ned. gld.

Mendu ĉe Oomoto Ekster Japanujo:
ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

D-ro Ŝ. HORI

La vivaĵoj en la insularo Jaejama (3)

KOKOSOKRABO (*Birgus latro*)
jap. Jaŝi-gani

En la norda parto de la insulo Iŝigaki mi iam kaptis ekzempleron de kokosokrabo. Ĝi estis ĉ. 10 cm longa ĉe la brusto kaj ĉ. 12 cm longa ĉe la ventro, kaj havis fortikajn pinĉilojn ; la maldekstra estis pli granda ol la dekstra. Sur la kruroj kreskis dornoj kaj malmolaj haretoj tiel dense, ke ili forte "imponis" nin. Mi donis ĝin al studento, kiu akompanis min kaj kiu arde deziris kunporti ĝin al sia hejmo. Sed en nokto ĝi unu fojon eskapis el kartona skatolo. Li do enpakis ĝin atenteme en pli solidan keston. Vane ! Ĝi ree forkuris ien. La pinĉiloj facile dispecigas krajonon kaj frakasas eĉ trunkon de bambuo ĉ. 2 cm dikan. La eskapo estis tial sendube tre facila laboro por la krabo. Oni diras, ke por liberigi sin de ĝia pinĉado, oni forte premu ĝian senteman ventron. La ventro estas globe dika kaj grasa, tiel ke la loĝantoj nomas la krabon "Ung-nja", kiu signifas viron kun granda testikujo.

Oni ne scias, de kiam la krabo estis nomata "Kokosokrabo". La latina nomo "latro" signifas ŝteliston aŭ banditon aŭ vojrabiston. La angla "Robber crab" kaj la germana "Palmendieb" signifas krabon, kiu ŝtelas la frukton de kokoso. Turistoj al sudaj insuloj ofte priskribis pri la kurioza ekologio de la krabo. Gill, misiisto, kiu antaŭ ĉ. 80 jaroj vojaĝis al izolitaj insuloj de Pacifiko, skribis kiel jene : "La kokosokraboj ofte suprenrampas la kokosarbon kaj ĵetas malsupren la fruktojn. Aliaj kraboj atendantaj sub la arbo senŝeligas ilian dikan ŝelon. Por tio ili ordinare bezonas unu nokton, kaj en la dua nokto ili frandas la internaĵon. Al grandaj kaj fortikaj kraboj unu nokto sufiĉas por la laboro, ĉar ĉiu el ili havas la kapablon ĵeti la frukton kontraŭ ŝtono por difekti la solidan ŝelon.

Ankaŭ Darwin priskribis en "La vojaĝo en Biegle" pri la krabo : "Por senŝeligi la fruktojn ĝi uzas la fortikajn pinĉilojn ; tamen dubinde, ĉu ĝi supreniras la arbon kaj ŝtelas frukton."

Andrews sukcesis foti la krabon suprenirantan la arbon kaj elmontris la foton en la Brita Muzeo de Londono. Tamen multaj esplorantoj nuntempe ne volas kredi, ke ĝi suprenrampas la arbon, kvankam ili



Kokosokrabo

konsentas, ke ĝi manĝas la fruktojn.

En la insularo Jaejama kreskas neniaj specoj de kokosarboj krom *Cyp hekentis Savoryama* (jap. Nojaŝi), kiu estas tamen ne facile trovebla, escepte en kelkaj lokoj de Iŝigaki kaj Iriomote. La insulanoj diris al mi, ke la kraboj manĝas la fruktojn de Adano (*Pandanus tectorius* v. *liukiuensis*). La arbo kreskas dense sur la marbordo de la insuloj; ĝiaj glavformaj folioj havas ĉe sia rando multajn dentojn malmolajn kaj malgrandajn, kaj ĝiaj fruktoj tute similas al tiuj de ananaso en formo kaj grandeco. Laŭ Alcock la krabo multe vivas en la insulo "South Sentinel", kie oni trovas ne kokosarbojn, sed nur adanarbojn. Laŭ la supre menciita priskribo mi pensas, kvankam ne konstatite, ke la kraboj en la insuloj, kie kokosarboj mankas, certe manĝas la fruktojn de Adano.

Gill iam skribis, ke la indiĝenoj en la insuloj de Pacifiko manĝas la krabojn. En la insuloj Manihiki kaj Rakaanga du aŭ tri viroj sufiĉas por kapti dumnokte 80–100 krabojn. Kiam ili certigas al si per bastoneto la ĉeeston de krabo en truo iom kliniĝinta, ili elfosas ĝin el la truo. Se la truo estas malprofunda, ili etendas sian brakon laŭlonge de la supra parto de la truo, kaj premkaptas la krabon ĉe la dorso, singarde kontraŭ la danĝeraj pinĉiloj. Ili forigas al ĝi en tiu loko la pinĉilojn kaj ĉiujn krurojn, kaj enmetas ĝin en kaĝon.

Laŭ Alcock virkrabo kreskas ĝis 5–6 funtojn peza, ĉ. 8 colojn larĝa kaj ĉ. 1 futon longa; la plej granda kruro estas 1 futon longa kaj ĉ. 8 colojn en ĉirkaŭo. Se oni maksimume etendas la krurojn, ili atingas la larĝecon eĉ de 2.5 futoj. Chun rakontis, ke li foje kaptis krabon ĉ. 35 cm longan; ĝi havis sufiĉe da viando por kontentigi la stomakojn de kelkaj homoj.

Taŝiro, japano, skribis, ke la krabo vidiĝas tre groteska kaj kruela, sed ĝia viando estas la plej bongusta el ĉiuj tiaspecaj; precipe frandinda estas la viando de la pinĉ-

ilo. Ĝi enhavas multe da blanka viando en la brusto kaj multe da graso en la ventro. Oni uzas la grason por kuiri birdaĵon, fiŝon, legomojn, ktp.

La loĝantoj de la insuloj Jonaguni kaj Hateruma kaj Aragusku manĝas la krabon, sed en la insulo Iŝigaki oni ne manĝas ĝin, tial mi bedaŭrinde ne havis la ŝancon gustumi ĝin dum mia restado.

La popoloj en Jonaguni kredas tradicie, ke la krabo demetas frajon en la 13-a de julio laŭ la malnova kalendaro. Multaj esplorantoj atestas, ke ĝi ĉiutage trempas sin en maro, dum kelkaj erare neas tion.

Laŭ Moseley la indiĝenoj en Zamboanga diras, ke la ina krabo kunportas en majo ovojn sub sia ventro kaj protektas la idojn eloviĝintajn ĝis ili kreskas en formo de sia patrino.

Laŭ Alcock la krabo en la insulo South Sentinel demetas frajon en decembro, sed li ne povis respondi la demandon, ĉu la ido vivas sur tero ekde ĝia eloviĝo, aŭ ĉu ĝi pasigas sian larvotempon en akvo.

Arthur Eilley, kiu studis la krabon en la insulo Loyalty, konfirmis, ke ĝi demetas frajon en maron kaj post la eloviĝo la larvo pasigas sian zoea-tempon en maro. La observado sufiĉe klarigas la demandon, kial la krabo distribuas sin tiel vaste, eĉ en izolitaj insuloj en Pacifiko, kvakam ĝi ĉiam vivas sur la tero.

Internacia Amasa Disiĝo

Masayuki KURODA

La 15-an de aŭg. 1965, en la lasta tago de Oomoto Internacia Festivalo mi renkontis la neforgeseblan internacian disiĝon en la vivo.

Plorflustroj fluas
sur adiaŭ-ŝtuparo,
ni draste ĝuas
neforgese intiman
disiĝon tristaniman.

*

En koridoron
ĉiuj kune svarmiĝis
banite en ploron,
svingis ni manojn verve,
busoj prokrastiĝis serve.

*

Foras barketoj
unu post la alia,
fluas klarnetoj
nin tiklas melodio
kun disiĝ-afekcio.

*

Startis barketoj,
sinsekvas adiaŭ-kri',
flagras flagetoj
ruĝ-Diaj kaj verdstelaj
laŭ bordoj Hoz-riveraj.

*

Fluas sopiro
al iliaj hejmlandoj
laŭ ekŝipiro.
Ĝi ŝvelas en ĉielo
sur bordo de Hoz-rivero.

*

Serenas hele
ĉielo mezsomera,
pikas miele
adiaŭ-melodio
en mansvinga medio.

T. Nakamura

KONVENI ESTAS NE MALPLI MALFELIĈA VORTO

Ĉar ĝi estas ofte uzata por substitui, kion ĝi ne povas, la mankantan formon de dativa komplemento de *deci*, kiun mi proponis plenigi — en la antaŭa ĉapitro — per formo : *aldeci al*. Tial mia lingva eseo pri la antaŭa temo ne povas esti kompleta sen iom pritrakti ankaŭ la verbon *konveni*. Mi do komencos, same kiel antaŭe, per unuaj rimarkoj pri la karakterizaj trajtoj de tiu malsamsignifa, sed ofte samsortanigata verbo.

RIM. 1. *Konveni* laŭ la etimologio (L *convenire*) signifas : kune veni t.e. akordiĝi, adaptiĝi.[1] Tio signifas proksimume : du aferoj *kun-venas* por bona adaptiĝo.

RIM. 2. *Konveni* estas senpersona verbo ; tial ĝi ne povas esti uzata kun persona subjekto kaj infinitivo. Ni do ne povas diri : *mi* konvenas — i, ktp.

RIM. 3. La dativo (*al* aŭ *por*) kun la verbo *konveni* enkondukas ties komplementon. (Kp. : *deci*, kiun la dativoj faras kopulo por enkonduki predikativon.)

I. La SUBJEKTO de la predikata verbo *konveni* povas esti aĵ-/ec-substantivo, infinitivo aŭ agsubstantivo.

A. Kiam la SUBJEKTO estas aĵ- aŭ ec-substantivo, la DATIVO (*al/por* iu aŭ io) difinas la koncernat(aĵ)on, al kiu la subjekta io bone adaptiĝas, kiel : la jako konvenas al mi ; tiu apartamento ne konvenas por vi. Aliaj ekzemploj :

> Ĝi (artista diletanteco) posedas kelkan valoron en salonoj, *konvenas al* stato de riĉeco, spicante ĝin per certa dozo da ĉarmo, poezio... (*Marta*, p. 83).
>
> La plumoj kaj la rubandoj *al* la junularo *konvenas* en ne malpli alta grado, ol la manteloj kaj la varmaj peltoj *konvenas al* maturaj maljunuloj (*Hamleto*, p. 137).

---

1) *Naŭlingva Etimologia Leksikono*, jam citita.

B. Kiam la SUBJEKTO estas infinitivo aŭ agsubstantivo, la DATIVO (*al*, *por*) difinas la "subjekton" de la ago.

Al mia kor' konvenas nun *funebri* (*Hamleto*, p. 9).

(Estas la komplemento "mia kor' ", kiu *funebras*.)

Por bela buŝeto de virino nenio malpli konvenas ol *prediko* (*Marta*, p. 51).

(Estas la komplemento "bela buŝeto", kiu *predikus* — jen kio ne konvenas.)

C. Kiam la DATIVO *por* estas uzata por enkonduki suplementon de la adjektiva formo *konvena*, ĝi esprimas ideon pri celo de konvena (laŭcela, ĝusta) uzo. Ekz-e :

Por funebro tiuj ruĝaj ŝuoj certe estis ne tre *konvenaj* (Z).

Tiu ĉi momento ne estas *konvena por* revoj.

Tiu ĉi esprimo estus pli *konvena por* alia okazo.

La SUBJEKTO de tiuj ekzemploj (pruntitaj el P. V.) estas konkreta objekto aŭ abstrakta afero (aĵ/ec-substantivoj) ; nur tiam la uzado de la verba formo estas senkonfuza, kiel : *Por* funebro *tiuj ruĝaj ŝuoj* certe ne tre *konvenis*, ktp. Alia ekzemplo :

Eksonis tia *muziko*, kia *konvenas por* la kuirejo.[2)]

Sed ATENTU, se la SUBJEKTO staras en AGSUBSTANTIVO ; tiam la komplemento estas la "subjekto" de tiu ago. Ekz-e :

Por bela buŝeto de virino ne *konvenas prediko* (vd. I,C).

Ĝis ĉi tie, nenio kaŭzas rimarkindan konfuzon.

II. Sed en la P.V. de SAT ni legas la Rimarkon sub *konveni* : "*Deci* rilatas al ĝeneralaj reguloj, kaj tial estas ĉiam uzata senkomplemente : *konveni* rilatas al aparta situacio, kaj tial plej ofte uzata kun komplemento ; sed tiu distingo ne estas ĉiam precize observata".

---

2) Laŭ *Fabeloj* III, p. 130, kie Z. uzis *decas* ; sed tiu ekzemplo estas la ĝusta okazo por uzi *konvenas*, ĉar temas pri bona adaptiĝo de "tia muziko" por la kuirejo, sed ne temas pri ia ago, kiu decus. Pro la sama kialo, ni legu : "Li vidis, ke la malbelo ofte ricevas la kronon, kiu *konvenas al* la belo", anstataŭ "...kiu *decas al* la belo" en *Fabeloj* III, p. 118.

Tiu Rimarko, kvankam ĝusta laŭ konstato pri la ĝisnuna uzado, tamen ne klarigas la kaŭzon, kial tiu distingo ne estas ĉiam precize observata. La fakto estas, ke ankaŭ *deci*, kiel ni jam vidis en la antaŭa ĉapitro, bezonas komplementon por esprimi, ke la *ago* (konduto aŭ sinteno) estas *laŭdece konforma al iu*. Jen sekvas la du tipaj ekzemploj, kiuj konfrontiĝas por atesti, ke mankas adekvata formo por esprimi tion :

1. *Decas al ni* plenumi ĉian justecon (*Mateo*, 3,15).
2. Ne *al la reĝoj konvenas* trinki vinon (*Sentencoj*, 17,7).

La unua formo estas netaŭga kiel la dua por esprimi la okazon de laŭpersona ago-konformeco. Pri la forma netaŭgeco de 1 mi jam eksplikis en la antaŭa ĉapitro. Pri la senca netaŭgeco de 2 : Kial ne ? — Eĉ al la reĝoj konvenus aŭ ne konvenus trinki vinon sub certaj cirkonstancoj, tute same kiel al la ordinaraj homoj. En tiu citita frazo troviĝas nenia klariga adjekto, kiu pravigus la uzon de la verbo *konveni*. Sed kion la sentenco intencas esprimi, tio temas ne pri "ne-konveneco", sed pri laŭpersona ne-konformeco de la ago trinki vinon, t.e. rilate al "la reĝoj".

Certe *deci* rilatas al ĝeneralaj decreguloj, tamen la du ĉi-supraj frazoj el nia uzata lingvo pledas, ke ankaŭ *deci* kelkfoje rilatas al aparta situacio, kaj tial, same kiel *konveni*, bezonas komplementon, sed tiam ĉi tiu postulas por si apartan gramatikan formon por distingi sin de la kopula *deci al* + predikativo (vd. en la antaŭa ĉapitro : I, C kaj II).

Se, do, al la du ekzemploj ni aplikas la formon, kiun mi proponis, por enkonduki komplementojn, ili fariĝas :

1. *Aldecas al ni* plenumi ĉian justecon.
2. Ne *al la reĝoj aldecas* trinki vinon.

III. Kiel ni vidis ĉi-supre, la problemo, aŭ la kaŭzoj de misuzado, okazas nur kiam temas pri *ago*. Por forigi la kaŭzojn de tia misuzado, ni devas antaŭ ĉio distingi tri apartajn okazojn, por kiuj uziĝas la tri apartaj formoj : *aldeci al*, *deci al* kaj *konveni al*.

1. Se la ago estas laŭdece konforma al iu laŭ ties persona karaktero aŭ socia stato, tiam ni uzu la formon : *aldeci al* iu. Por indiki tiun okazon, mi uzos, kiel mi jam uzis ĉi-supre, la terminon : LAŬPERSONA AGO-KONFORMECO. Ekz-e :

Al ĉiu esperantisto *aldecas respekti* la "Fundamenton".

2. Se la ago estas konforma al la deco por esti atribuata (donata) al iu, tiam ni uzu la formon : *deci al* iu. Por indiki tiun okazon, mi uzos la terminon : LAŬDECA AGO-ATRIBUO. Ekz-e :

Al la "Fundamento" *decas respekto* de ĉiu esperantisto.

RIM. 4. 1. LAŬPERSONA AGO-KONFORMECO : aldeci al.
2. LAŬDECA AGO-ATRIBUO : deci al.

Okazoj de tiuj du difinoj pri *deci* : la unua, per kiu mi nur vortigis ĝian signifon kun cito de la frazoj jam tiusence uzitaj, kaj la dua, kiun ankaŭ validigas la ekzemploj jam cititaj, estas entute ellasitaj el la P.V. de SAT, kaj la traktado pri ambaŭ forestas el la Plena Gramatiko de K-W. Ambaŭ verkoj okupiĝas nur pri la uzado de *deci* kun infinitiva aŭ propozicia subjekto (t.e. nur pri I, A kaj B en la antaŭa ĉapitro).

3. Se la ago adaptiĝas bone (laŭcele, ĝuste ktp) al iu laŭ certaj cirkonstancoj, tiam ni uzu la formon : *konveni* al iu. Por indiki tiun okazon, mi uzos la terminon : LAŬCIRKONSTANCA AGO-ADAPTIĜO. Plejofte la adjektoj (cirkonstancaj komplementoj) pravigas la uzon de tiu formo. Ekz-e :

Al neniu *konvenas trinki* vinon *rekte el barelo.*

IV. Laŭ tiuj kriterioj en III ni vidu, kiel ofte ĝis nun la verbo *konveni* estas uzita neadekvate, ĉefe pro la manko de konvena formo por esprimi la okazon de laŭpersona ago-konformeco (III, 1). Por vidi tion, mi ĉi-sube citos kelkajn ekzemplojn kun aldono de miaj komentoj. Ĉiuj komentotaj frazoj estas el nia tradukita klasika literaturo kaj ili interesas min nur en la kadro de sia formo de traduko ; do ne koncernas min tio, kiel ili staras en la originala teksto. Ĉe du-tri citaĵoj mi iom kuntiris la frazon per ellaso de kelkaj vortoj, kiuj estas superfluaj ĉi tie.

* Obstine kaj sen ia fino plendi, —
Agado tia estas granda peko
Kaj tute ne *konvenas al* la viro (*Hamleto*, p. 13).

Ĉar la subjekto estas ago (agado tia), oni povas parafrazi : al la viro tute ne konvenas tiel agadi. Sed en la kunteksto de la verstrio ne troviĝas eĉ unu vorto, kiu priskribus la situacion por aktuala ago-adaptiĝo

(ĉi tie ne-adaptiĝo)[3]; sed ja troviĝas nur la ne-konformeco de "tia agado" al *la viro* : do temas pri la laŭpersona ne-konformeco de la ago. Tial mi volus proponi legi la du lastajn versojn :

Agado tia estas granda peko
Kaj tute ne *aldecas al* la viro.

* Kviete, kiel ĝi *al vi konvenas*,
Vi, reĝo, staras kontraŭ malamikoj (*Ifigenio*, p. 101).

Kvazaŭ por la reĝo konvenus embuski malamikojn (konveni = laŭcirkonstanca ago-adaptiĝo) ! Sed ne pri tio temas. Same kiel en la ĉi-supra ekzemplo, la enhavo temas pri laŭpersona (reĝa) ago-konformeco. Mi do proponus legi :

---

3) Kp. : "Al mia kor' konvenas nun funebri" (citita en I, B 1, ĉi-supre), en kiu frazo la du esprimoj *mia kor'* kaj *nun* difinas la precizan situacion por ago-adaptiĝo. La apartan situacion aŭ cirkonstancon por aktuala adaptiĝo aŭ ne-adaptiĝo de la ago precizigas aŭ 1) la komplemento konsistanta eĉ el tia unu-sola vorto, kiu individuigas eĉ abstrakte sed karakterize, kiel en "Tia agado ne konvenas al *malkuraĝulo* (= la viro, kiu estas malkuraĝa); aŭ 2) la adjekto, kiel en "Tia agado ne konvenas al la viro *por gajni respekton de la virino*" ; aŭ 3) la subjekto kiel en "Al la viro ne konvenas *porti la virinajn ŝuojn*", ktp.

Necesas, tiamaniere, ke unu el la termoj precizigu apartan situacion, ĉar la ago-adaptiĝo al iu estas ĉiam LAŬCIRKONSTANCA (kontraste al la okazo de ago-konformeco, kiu estas LAŬPERSONA) : nenia *ago* povas al iu *konveni* aŭ *ne konveni* sendepende de la cirkonstancoj. Kaj ĉi tio estas samtempe la kaŭzo, kial en multaj okazoj, se la subjekto staras en infinitivo aŭ *ad*-substantivo, la propozicio enhavas nur adjektojn, kiuj klarigas la cirkonstancon, kiel ekz-e : amasbuĉado konvenas *en la milito* ; longa salutparolado ne konvenas *en la malferma soleno de la Kongreso* ; *en domo de pendigito* ne konvenas paroli *pri ŝnuro* ; kaj se ĝi enhavas neniajn adjektojn, sed nur *al*-komplementon, ĉi tiu klarigas la situacion adapte al la subjekto, kiel ekz-e : *al bela buŝeto de virino* ne konvenas *prediko* ; aŭ la klariga propozicio, kiel en : tia agado ne konvenas por mi, *ĉar mi ne disponas aŭton* — ekzemple.

Tamen tia cirkonstanca priskribo ne estas nepra en la okazoj, se la subjekto staras en *aĵ*-substantivo, ĉar la konveneco aŭ ne-konveneco de ia *aĵo* (konkreta aŭ abstrakta) estas plejofte LAŬOBJEKTA, — eĉ sencirkonstanca ; do sen adjektoj, kiel ekz-e : *la jako konvenas al mi* ; *kio konvenas al sciuro ne konvenas al vulturo*, ktp. Kompreneble ĝi povas esti ankaŭ nur cirkonstanca : negliĝo konvenas *nur por hejma uzo*.

El tio sekvas, ke la difinoj 1 kaj 2 pri "konveni" en P.V. ŝajnas al mi iel kunordigeblaj en unu solan difinon por la okazoj de *aĵo*-adaptiĝo, kaj estos bone, se la 2-a pritraktos nur la okazojn de *ago*-adaptiĝo. (La 3-a en P.V. atentige montras kelkajn ekzemplojn, en kiuj *konveni* estas uzita kun la signifo de *deci* ; do, tie, *deci* estas korekta.)

Trankvile, kiel (ĝi) *al vi aldecas*,
Vi, reĝo, staras kontraŭ malamikoj.[4])

* Kiel neĝo en somero, kaj kiel pluvo en tempo de rikolto, tiel ne *konvenas honoro por malsaĝulo* (*Sentencoj*, 26, 1).

La signifo de la tuta frazo estas facile komprenebla laŭ la kunteksto. Sed troviĝas gramatika malglataĵo en la substrekita parto. Ĝia subjekto *honoro* estas agverba substantivo tiel ke la komplemento *malsaĝulo* fariĝas la "subjekto" de tiu ago, kaj tial tiu frazparto signifas : por malsaĝulo ne konvenas honoro (= estas malsaĝulo, kiu honorus. Vd. : Ne konvenas batalo por timemulo = estas timemulo, kiu batalus). Pri tio ne temas. Kion la sentenco intencas esprimi, tio temas ja pri ne-konforma ago-atribuo — *honoro* → *por malsaĝulo* : *al* malsaĝulo *ne decas* honoro. Tamen la verbo *deci* ne estas aplikebla al la komparitaĵoj (neĝo kaj pluvo) en la subpropozicioj. Cetere, "neĝo en somero" estas ne *konforma* al la natura irado de la sezono (por ne diri laŭcirkonstance, ke ĝi estus *konvena* por ekstersezona skiado) : "pluvo en tempo de rikolto" faras la laboron ne *konforma* al la tagordo (por ne diri laŭcirkonstance, ke ĝi estus *konvena* por endoma laboro aŭ ripozo). Kaj tial mi preferus legi :

Kiel neĝo en somero, kaj kiel pluvo en tempo de rikolto, tiel ne *konforma* estas honoro por malsaĝulo.[5])

* Mi diras do, ke virinoj sin vestu per decaj vestoj, kun modesteco kaj sobreco ; ne kun harplektaĵoj, aŭ oro, aŭ perloj, aŭ multekostaj vestoj ; sed (kio *konvenas al virinoj* konfesantaj la piecon) per bonfaroj (*I Timoteo*, 2, 9).

Neniu el ni dubas, ke al ĉiuj virinoj, konfesantaj aŭ ne konfesantaj la piecon, konvenas — malgraŭ la aludo pri nekonveneco — porti tiajn ornamaĵojn kaj luksajn vestojn depende de la cirkonstancoj (konveni = laŭcirkonstanca ago-adaptiĝo). Ankaŭ la apostolo Paŭlo ja sciis tion ; jen do, kion li admonis, tio temas ne pri la konveneco, sed pri la konformeco de la ago al la kristaninoj *ne* surmeti ilin, sed esti vestitaj per decaj vestoj kaj virtaj agoj. Do, la frazon inter krampoj mi proponus legi :

---

4) Preferinde : *trankvile*, ĉar temas pri animstato de la reĝo. La pronomo "ĝi" estas uzita de Z. kun valoro de *tio*, kiun, oni nun plejofte forigas el tia subpropozicio.

5) "La profesioj instruista kaj artista montriĝis ne *konformaj por vi*" (*Marta*, p. 87).

(kio *aldecas al la virinoj* konfesantaj la piecon)...

* Malĉasteco kaj ĉia malpureco kaj avideco ne eĉ estu nomataj inter vi, kiel *decas por* sanktuloj ; nek ia hontindaĵo, nek sensenca parolado, nek tro libera babilado, kiuj ne *konvenas* ; sed prefere dankesprimo (*Efesanoj*, 5, 3–4).

Deci kun dativo (*por*) funkcias kiel kopulo, kaj esprimas okazon de laŭdeca ago-atribuo ; tiele, la subpropozicio signifus : kiel *decas por sanktuloj* (ke ĉi tiuj ne aŭdu la tri malvirtojn eĉ nomataj *inter vi*). Sed pri tio ne temas. Por esti konforma al la signifo de la tuta enhavo, *deci* devas funkcii proprasence (ne kopule) ; ni do uzu la saman prepozicion *inter* en la kompara subpropozicio kiel en la ĉefpropozicio ; cetere, anstataŭigu la lastlinian *konvenas* per *decas*, ĉar temas ĉefe pri agoj, kaj ĉio estos en ordo :

> Malĉasteco kaj ĉia malpureco kaj avideco ne eĉ estu nomataj inter vi, kiel *decas inter sanktuloj* ; nek ia hontindaĵo, nek sensenca parolado, nek tro libera babilado, kiuj ne *decas*, sed prefere dankesprimo.

* *Al* malsaĝulo ne *konvenas* alta parolado (*Sentencoj*, 17, 7).

Ĉar la subjekto estas agsubstantivo, la komplemento (malsaĝulo) estas la subjekto de la ago : al malsaĝulo ne konvenas alte paroladi (= estas malsaĝulo, kiu farus altan paroladon). Jen kio estas neebla kaj kion la sentenco ne intencas esprimi. Temas pri tio : la ago (alta parolado) ne estas konforma al la deco por esti donata al malsaĝulo. Do, la ĝusta okazo por uzi la kopulan *deci* (= laŭdeca ago-atribuo) :

> *Al* malsaĝulo ne *decas* alta parolado.

* La leĝojn de la reĝo ili ne plenumis ; ne *decas al* la reĝo tiel restigi ilin (*Ester*, 3, 8).

Ĉar ne temas pri laŭdeca ago-atribuo, sed temas pri laŭpersona (reĝa) ne-konformeco de la ago *tiel restigi ilin*, mi proponus legi :

> La leĝojn de la reĝo ili ne plenumis : ne *aldecas al* la reĝo tiel restigi ilin.

* Da reĝa vino estis multe, kiel *decis al* la reĝo (*Ester*, 1, 7).

En la antaŭfrazo ne troviĝas ia ago, kiu decus ; do, *deci* estas ne-uzebla.

Ĉu ne la subpropozicio legiĝas en la hebrea teksto ; "konforme al la stato de la reĝo" k.s. ?

ALDONAJ NOTOJ

1. Senpersona verbo *konveni*, same kiel senpersona *deci*, uziĝas senkomplemente :

> Tia respondo ne *konvenas*. (Ne laŭcela)
> Tia respondo ne *decas*. (Ne laŭdeca)

Kaj eĉ sensubjekte-senkomplemente :

> Georgo nenion diris al tio, ĉar ne *konvenis* (*Fabeloj* IV, p. 188).
> Tiele ne *decas*.

2. Z-a ekzemplo, en kiu la demonstrativo *tio* staras iel por infinitiva frazparto :

> *Tio* estus tre konvena por mi *danci* kun vi (*Fab.* I, p. 36).

3. Nia amiko kaj kolektanto de Zamenhofaj ekzemploj, s-ro Rihej Nomura bonvolis havigi al mi i.a. du pecojn, en kiuj Z. uzis *deci* kun komplemento :

> Vi kondutos, kiel decas al bonedukita fraŭlino (*Revizoro* p. 77).
> Ne decas por Vi agi tiamaniere, ke Vi mortigu virtulon kune kun malvirtulo (*Genezo* 18,25).

Por nia studo mi ŝanĝos ilin en la predikativan signifon de ago-atribuo :

> Vi bone kondutos, kiel decas al respektata majstro.
> Ne decas por Vi, ke ni filoj mortigu unuj la aliajn en la nomo de milito.

Neniu povus kondamni ĉi tiujn esprimojn, se oni, kun mi, konsiderus korekta la jenan duopon da frazoj : "Venĝo decas al malamiko" kaj sekve, "Li venĝis sin, kiel decas al malamiko". Ĉu do, nur la kunteksto decidu, ke la samforma dativo funkcias komplemente aŭ predikative ? Mia opinio restas, ke nepre necesa estas la distingado inter la du signifoj *aldeci al* (= laŭpersona ago-konformeco) kaj *deci al* (= ago-atribuo al iu), kiel mi jam demonstris, pro bezono ankaŭ en aliaj rilatoj kun *konveni*, ĉi-supre.

HELPEMULO

Estas hom' helpanta grandanime,
man-etendas eĉ de malproksime.
Al hom' en mizero li tuj venas,
kaj la dankesprimoj lin eĉ ĝenas.
Pro l' modestec' kaŝas li la nomon,
kaj mi plej estimas tian homon! (*1963*)

INFANAĜA AMIĈJO

En la sama klaso ni kunstudis,
sur la sama benko ni kunsidis,
en la sama korto ni kunludis
kaj ni unu je alia fidis.

Poste la lernejon ni forlasis.
Ĉiu iris sian propran vojon.
Multaj jaroj jam de tiam pasis,
kaj ni ne renkontis nin eĉ fojon.

Sed dumnokte ofte mi memoras
pri l' amiĉjo el la temp' lontana,
kaj la kor' refoje ekdoloras
pro l' sopiro brula kaj tutvana.
(*1963*)

lontana = malproksima

AL F-INO FIORENZA GALEAZZO

Kiam vokas mi ĉi nomon dolĉan,
tuj aperas Itali' transmara.
Kvazaŭ vidus mi ĉi landon sorĉan,
kaj vin, mia amikino kara.

Ofte revas mi en nokta horo
pri Rom', Venecio kaj Florenco,
pri Sorento, Kapri ĉe l' aŭroro,
kaj pri vi, ho mia Fiorenza.

Baldaŭ venu la feliĉa tago,
kiam ni salute nin renkontos!
Kune ni promenos ĉe la lago.
Al vi diri ĉion mi ne hontos!
(*1964*)

47

Helpis min ĉe l' stacidomo
deĵorant' — afabla homo.
Al mi servon li proponis,
kvankam lin mi ĵus ekkonis.

La akcento tuj atestas :
ni de l' sama provinc' estas.
Ni manpremis nin tre forte.
Pro ĝoj' restis mi senvorte.

Kore danki lin mi pretis,
kaj pri lia nomo petis.
Sed anstataŭ l' nomon veran
montris li sian numeron !

(*Sian, 1964*)

AFORISMOJ

Viv' sen lukto
= arb' sen frukto. (*1963*)

Por la genia verko
estas neniu ĉerko.

Se amiko pasas sen saluti,
al li vi preferu ankaŭ muti ! (*1964*)

La batalo de plum' kaj de lango
vundas pli ol la batal' en sango.

Homo mistraktanta beston estas best' en vesto,
homo mistraktanta homon estas homa besto.

Viv' sen celo
= bark' sen velo.

Kiu havas kalojn sur la mano,
estas la plej digna homarano.

Viro, kiu nur generi scias,
pri la propra rolo ne konscias.

En la sci' ne estas lim' de halto.
Trans la sci' neeblas ajna salto. (*1965*)

S-ino Haudebine en Japanujo

Post pli ol ses-jara laborado por Esperanto en Hindujo, s-ino Madeleine Haudebine, francino kaj bonkonata instruistino de la Cseh-metodo, venis al Japanujo lastjare, kiel komisiito de Universala Esperanto-Asocio. Post la 50-a Universala Kongreso en Tokio, ŝi metis sian laborbazon en Kameoka, sub la prizorgado de Oomoto, interkonsente kun UEA, por ŝia restado kaj laborado en ĉi tiu lando. Ŝi komencis laboron ekde septembro en Kameoka kaj Kioto por tri apartaj Esperanto-kursoj. Pro la fakto ke la rekt-metoda kurso de la internacia lingvo fare de sperta gvidanto okazas ĉi tie por la unua fojo, multaj kursanoj fervore sekvas ŝian gvidadon. Ni prezentas ĉi-sube la impresojn de unu el ŝiaj kursanoj. — *La Red.*

Estas sendube, ke la lastatempaj grandiozaj okazaĵoj de Esperanto entuziasmigis ĉiujn japanojn, kiuj partoprenis aŭ vidis ilin. Post la Internacia Festivalo de Oomoto, multaj junaj gelaborantoj ĉe la Oomoto-centro volonte petis al s-ino Haudebine, Esperanto-instruistino, ke ŝi gvidu ĉi tie Cseh-metodan kurson. Ili streĉe atendis la unuan tagon de la kursoj por du apartaj grupoj el po 30 gelernantoj.

Laŭ la japana eduk-sistemo oni lernas latinan alfabeton en la supera klaso de la elementa lernejo kaj, en la mezlernejo, eklernas devige la anglan lingvon. Preskaŭ ĉiuj nuntempaj junuloj lernas la anglan lingvon, sed ili ne kapablas paroli kaj eĉ kompreni ĝin aŭskulte, ĉar ili lernas nur la gramatikon laŭ lernolibroj, sed ne ĝian praktikan uzon. Tiu eduksistemo estas aplikata por lerni ĉiujn nejapanajn lingvojn. Pro tio la japanoj ĝenerale pensas ke por lerni fremdan lingvon ili unue devas lerni ties gramatikon, due komenci praktiki ĝin, kaj efektive ili penadas tiel agi. Post longa barakto, do, ili povas legi longan romanon, skribi bonajn frazojn, sed apenaŭ paroli.

Oni kutime agas same ankaŭ en Esperanto-lernado. Tamen, okaze de la 50-a Universala Kongreso en Tokio, oni devis pripensi la netaŭgecon de tiu metodo, kiu faras la lingvon nevivanta. Pro tio, dezirante kontakti kun la eksterlandaj esperantistoj, japanaj esperantistoj komencis pli multe provi sian parolkapablon, kaj ankaŭ la Esperanto-instruantoj kuraĝigis siajn lernantojn en la parola uzo de la lingvo. Sekve, montriĝis la fakto ke multaj eksterlandanoj admiris la bonan posedon de Esperanto ĉe multaj japanaj esperantistoj.

Kun tia tendenco en la fono, la rekt-metoda kurso de s-ino Haudebine renkontis bonan akcepton.

Ambaŭ klasoj en la Oomoto-centro havas mezlernejajn lernantojn, infanojn, patrinojn kaj pliaĝulojn,

krom pli multaj gejunuloj. Fakto estas, ke ĉiuj lernantoj ĝuas la atmosferon de la lecionoj, kiujn donas nejapana gvidantino per uzo de amuzaj, nekutimaj bildoj. Kvankam timeme, de la unua leciono ĉiu povis ekparoli, kio mirigis ilin mem kaj alportis al ili pli da intereso por la internacia lingvo. Tio verŝajne estis kaŭzita de la nuna metodo, kiu sekvas la principon de natura transdono de lingvo, kiel de patrino al la infano.

Tamen, preskaŭ ĉiuj lernantoj devis unue alkutimiĝi al la latinaj literoj, kiuj postulas ekzercadon ĝis oni povas skribi ilin facile. Pro tio estas granda laboro por multaj kursanoj kopii la frazojn skribitajn sur la tabulo en sian notkajeron. Multaj minutoj estas bezonataj por reskribi la ekzemplojn de novaj frazoj, plurfoje dum la leciono. Dume, la vortoj, kiuj aperas pli multaj ol en ordinaraj kursoj, estas tute novaj kaj oni ne povas rilatigi ilin al japanaj vortoj pro la malsimileco inter la du lingvoj. Sed la lernantoj aŭtomate memoras la lingvon per oftaj ripetoj de la vortoj en frazoj, konstante prezentitaj de la instruistino. Rilate al lingva malsimileco, ankaŭ la esprimmaniero ofte diferencas kaj tial okazas, ke por ŝpari tempon la "helpantino" foje klarigas japanlingve.

Unuopa leciono daŭras du horojn, dum kiuj la lernantoj tre atente aŭskultas, parolas, legas kaj skribas nekutiman lingvon. Kvankam tio sufiĉe lacigas ilin, la leciono neniam tedas; male ilin gajigas, ĉar ili ĝuas la lernadon kun ofta ridado. Tio ĉi estas en si mem praktiko de la lingvo, kaj ju pli progresas la lecionoj, des pli facile la lernantoj povas laŭgrade praktiki ĝin. Ŝajnas, ke la lerta gvidmaniero de s-ino Haudebine kun pli ol tridekjara sperto, faciligas la lernadon kaj havigas pli grandan rezulton ol alimetoda samdaŭra lernado.

Tiel interproksimiĝas la gvidantino kaj la kursanoj, ĉar laŭ tiu ĉi instru-sistemo ĉiam ripetiĝas la demandoj kaj respondoj kun unu nova vorto, kaj tiamaniere ekestas konversacio, kreante amikan atmosferon, kiu entute helpas al la kompreno de la novaj elementoj. La gramatiko estas enkondukata pere de ekzemploj, plej ofte kun ŝerco, kiuj memorigas la regulojn sen uzo de gramatikaj terminoj. Fakto estas, ke multaj personoj ne ŝatas la ekskluzivan lernadon de gramatiko, dum ili senkonscie lernas ĝin per la rekta metodo.

La kursoj estas tiel sukcesaj, ke la lernantoj deziras havi daŭrigan kurson per la sama metodo, post trimonata elementa lernado, por ke ili pli bone regu la lingvon internacian, kun pli da necesa kono pri gramatiko.

F-ino Jumijo Iŭamoto

D-rino Rosa Scolnik

"Ĉoko-Indiĝenoj" festas ĉiujn okazaĵojn per drinkado

Post kelkaj tagoj de navigado mi laŭiris la riveron Sankta Johano, kiu fluas impete al la maro, kaj du pliajn enfluajn riveretojn, ĝis mi atingis lokon nomitan Tambo, kie mi lasis la pirogon. De ĉi tie mi piediris mallongan distancon tra marĉa montara tereno kaj post unu horo kaj duono de marŝado mi alvenis al la rivereto Pepe' apartenanta al la baseno de la rivero Baŭdo'.

Nigrarasaj virinoj kaj infanoj, kiuj loĝas en tiu regiono okupiĝas pri transportado de varoj tra tiu "istmo", kiu kunigas la riverbasenon de Sankta Johano kaj Baŭdo'.

Mi tranoktis ĉe Sinjorino Leonisa, simpatia kaj ĝentila nigrulino. Ŝi vivas tiel mizere kiel la plimulto de la loĝantaro de tiu regiono.

Infanoj kaj plenkreskuloj estas malsanaj kaj malbone nutritaj. Ĉiuj, senescepte, estas intestparazitportantoj, kaj la suĉinfanmortado estas granda pro malario, frambezio kaj atrepsio.

La regiono estas tre malriĉa kaj la elĉerpita tero ne donas sufiĉajn rikoltojn. Konsekvence ĉiuj estas malbone nutritaj kaj vivas apatie, senambicie, ne povante eliri el tiu neelirebla cirklo.

La filo de Leonisa, nigra junulo, akceptis mian proponon por gvidi min kaj post 2 tagoj ni luis grandan boaton kaj forlasis tiun malbenitan regionon.

Prospera regiono nin atendas. — Ni malsupreniras la trankvilajn kaj malklarajn akvojn de la rivero Baŭdo' celante la fontojn de la enflurivereto Torreido', kie loĝas la tribo de la "ĉoko"-indiĝenoj. Dum pluraj tagoj ni vidas senĉese la monotonajn kaj kotajn bordojn de l' Baŭdo'.

Kiel mi sopiris al la agrablaj banoj en la sablobordoj de la rivero Atrato, je klaraj akvoj !

Ambaŭflanke mi vidas seninterrompe riz- kaj bananplantejojn. La tero estas fertila kaj la rikoltoj abundaj.

Malgrandaj ŝipetoj alvenas el Panama' por aĉeti ĉion kion oni kultivas, ĉefe bananojn. La enloĝantoj, negroj kaj mulatoj, haste disvendas ĉion, lasante preskaŭ nenion por la loka konsumado.

Tiamaniere ni veturis plurajn tagojn tranoktante en kabanoj, kiujn ni trovis survoje.

Ĉokoaj kabanoj, ĉu ili apartenas al riĉuloj aŭ al malriĉuloj, konsistas ĉiam el unu granda ĉambro kaj kuir-

ejo. En la ĉambro dormas la tuta familio, kune kun la gastoj kaj vojaĝantoj en ŝoka kunmikseco.

Nokte en ĉiuj liberaj spacoj oni metas litojn, matracojn aŭ matojn kaj estas vera aventuro atingi mian hamakon sen surtreti iun.

Finfine ni atingis la mallarĝan enflurivereton Torreido', je kristalaj akvoj kaj pitoreskaj bordoj. Post kelkaj horoj ni decidas pasigi la nokton en indiĝena kabano.

Tiu ĉi, kvadratforma kaj vasta, estas konstruita sur altaj fostoj ; en ĝi loĝas paro da indiĝenoj kun du filoj kaj unu junulino.

Viroj portas zonotukojn kaj virinoj sin kovras, de la talio ĝis sub la genuoj, per ĉirkaŭvolvitaj kotonaj ŝtofoj, nomitaj "paruma" ; la brustoj restas nudaj, nur ornamitaj per kolĉenoj el bidoj, odorantaj semoj aŭ arĝentaj moneroj, kiujn ili aĉetas en la vilaĝoj.

Viroj kaj virinoj sufiĉe bone parolas hispanan lingvon.

Oni rakontas al mi, ke la indianoj plenumas nun kolektivan laboron, nomitan "minga", ĉe Oktavo Abona', kiu loĝas en la proksimeco. Per tiu kolektiva laboro la indiĝenoj interhelpas al si laŭvice en ĉiuj agrikulturaj taskoj aŭ en la konstruado de kabanoj. Rekompence la dommastro regalas la helpantojn per ebriiĝa festo ("bebezon"), kiu daŭras kelkajn tagojn kaj noktojn ĝis la elĉerpo de ĉiuj trinkaĵoj.

Estis ja vera bonŝanco povi ĉeesti tiel interesan spektaklon ! Do, mi decidis tuj starti, malgraŭ la avertoj de mia remisto.

Pro la nokta abunda pluvado, la rivereto multe kreskis. Krome, kiam ni estis survoje, subite ekblovis forta vento akompanata de torenta pluvo, kaj nia boato danĝere komencis danci en la rapidega akvofluo. Do, ni estis

Indiĝenoj bonvenigas nin

devigataj halti, serĉante rifuĝon en kabaneto loĝata de nigruloj kaj mulatoj; tie ĉi ni atendis kvar longajn horojn ĝis la ŝtormo finfine ĉesis.

Ankaŭ ĉi tie oni malkonsilas al mi ĉeesti la ebriiĝan feston dirante, ke la ebriaj indiĝenoj estas nerespektemaj. Sed laŭ miaj spertoj mi scias, ke ili ne estas timindaj eĉ en tiaj kondiĉoj, kontraste kun ebriaj blankuloj aŭ mulatoj.

Kiam la pluvo ĉesas kaj la akvo de la rivero iom malkreskas, ni daŭrigas la vojaĝon.

Post du horoj ni alvenas al la Torreido'-kaskadoj, kie sur alta roko, staras la domo de Oktavo Abona'.

Unu horon antaŭ nia alveno ni jam ekaŭdis la laŭtaktan baton de la tamburoj kaj kiam oni ekvidis nin, ĝenerala ĝojega kriado eksonis.

Oni tre ĝentile akceptis min, speciale kiam ili ekvidis mian fotoaparaton. La dommastro, iom maljuna, invitis min pasigi la nokton en sia kabano. Mi tuj akceptis la afablan inviton.

Komenciĝas la festo. — En la kabano de Oktavo ariĝis ĉirkaŭ 70 personoj, inter kiuj kelkaj nigruloj kaj mulatoj de la najbaraĵo, allogitaj per la brando.

Flanke staras granda barelo plenplena je tiu ĉi alkoholaĵo, el kiu la ĉeestantaro elĉerpas brandon per ujoj faritaj el kukurbŝeloj.

Ĉiuj estas jam ebriaj.

Ŝanceliĝante, alproksimiĝas ebria indianino, kiu kunportas miajn pakaĵojn al la loko destinita por la virinoj kaj infanoj.

Kutime, en tiuj cirkonstancoj, viroj kaj virinoj estas apartigitaj.

Mi sidiĝas inter ili por observi la dancadon.

Kia seniluziiĝo ! Ĉi tiuj indiĝenoj dancas modernajn afro-amerikanajn dancojn laŭ la takto de tamburo.

Mi petas ilin, ke ili dancu ties proprajn dancojn, promesante fotografi ilin. Ili entuziasmiĝis kaj subite la kabano skuiĝis per la piedbatado de dekoj da personoj.

Viroj kaj virinoj dancas aparte. La lastaj viciĝas fronte, ŝultron ĉe ŝultro, prenante la talion de la kunulino per unu mano ; ili fleksas iomete la torson antaŭen kaj gracie klinas la kapon sur la bruston.

La unua virino de la vico delikate frapas per la pintoj de la fingroj, tambureton barelforman kaj samtempe, ŝi flankensaltetas kun kunigitaj piedoj ; dum la aliaj laŭtakte imitas ŝiajn movojn. Mallongaj monotonaj krioj akompanas la dancadon.

La viroj, kontraŭe, rektestarante, fiere dancas, laŭ la ritmo de tamburo, kelkajn paŝojn antaŭen kaj tuj poste malantaŭen. Indiĝena flutisto mildigas la kvazaŭan milit-dancon per

agrabla melodio.

Dum horoj la homa ĉeno dancas senlace.

Ĉiuj sociaj kunvenoj kaj festoj okazas en la interno de la kabanoj, ĉar, ekstere, la grundo estas ĉiam marĉa kaj malbonodora, pro la konstantaj pluvoj kaj rubaĵoj tien forĵetitaj.

Subite, inter du dancoj, aŭdiĝis tumulto kaj fortaj batoj kontraŭ la planko. Temis pri lukta konkurado.

La rivaloj korpe batalas, sen armiloj ; ambaŭ klopodas alkroĉiĝi per ambaŭ manoj al la hararo de la kontraŭulo, por lin renversi teren.

Ili devas elmontri fortecon, lertecon kaj facilmovecon.

Ili donas al si reciproke terurajn batojn kontraŭ la planko ĝis, finfine, rompiĝis unu trabo kaj la planko parte cedis. Tamen, ili daŭrigis la lukton, iom post iom pli sovaĝe, trenante sin reciproke sur la planko, ĉiam alkroĉitaj al la hararoj. En pluraj okazoj ili, laŭvice, levas alten la korpon de la kontraŭulo, ĉirkaŭturnante kaj koliziigante ĝin kun kelkaj malatentuloj, kiuj falas teren.

Rondo da spektemuloj incitas la luktantojn, kriante intermite : ĥi ! , ĥi ! , ĥi !

Por elteni tiujn terurajn batojn oni ja bezonas grandan fizikan reziston !

La lukto ĉesas, kiam unu el ili sukcesas, lerte, ke la rivalo dekroĉu la fingrojn de lia hararo.

Tiam, la ĉeestantaro admiras la venkinton.

Ankaŭ la virinoj luktkonkuras similmaniere, sed ne tiel brutale.

Kelkfoje, la indianinoj kolerkrias, ploras kaj sin insultas reciproke ; tiam oni disigas ilin.

Neniam luktas viro kontraŭ virino. Nur unu paro provis ŝerce, tion

Ĉoko-indiĝenoj dancas

fari, sed ili baldaŭ disiĝis.

Inter du luktkonkuradoj, la ĉeestantaro dancas kaj abunde drinkas. Kelkaj el ili, mortebriaj, sin trenas sur la planko vomante.

Ĉiuj brue krias.

Mi firme malpermesas Valentenon, mia nigra gvidremisto, trinki brandon, ĉar morgaŭ li devas veturigi min. Kaj por ke li obeu min, mi devas lin streĉe gardi kaj eĉ minaci lin per tute neekzistanta pistolo, ĉar alkoholaĵoj nekontraŭstareble altiras tiujn homojn.

Faŭsteno estas la sola preskaŭsobra indiĝeno de la kunveno; li klarigas al mi la signifon de la festo kaj ankaŭ prenas sur sin la taskon protekti min de la tro babilemaj drinkemuloj. Indiĝenoj, nature prudentaj kaj silentemaj, fariĝas tro babilemaj kiam ili ebriiĝas. Sed, Faŭsteno pli indignas, kiam al mi alproksimiĝas iu ajn ebria nigrulo, kiun li tuj forpelas kiel hundon.

Eĉ post meznokto daŭras drinkado, sed la entuziasmo iom post iom malpliiĝas.

Laca mi kuŝiĝas sur mato, apud la virinoj kaj infanoj. Simpatia maljunulino kuŝiĝis kiel ŝirmilo ĉe mia flanko. Infanoj kaj maljunulinoj kutime ne trinkas brandon.

Intermite oni aŭdas kanti aŭ plori aŭ vomi. Restas malmultaj horoj ĝis la mateniĝo.

Frumatene ni pretigas ĉion por forvojaĝi.

Kiel kompatindan aspekton havis la indiĝenoj post la festo! Malpuraj, malkombitaj, kun senordaj ornamaĵoj kaj ĝemante pro ventrodoloroj, ili sin preparas por daŭrigi la drinkadon en najbaraj kabanoj.

Albordiĝas kelkaj kanotoj kun genigruloj, kiuj venas vendoferti pli da brando.

Pro la torentaj noktaj pluvoj la mallarĝaj valetoj estas inunditaj kaj tio plifaciligas kaj plirapidigas nian revenvojaĝon.

Iun matenon ni trovis nian kanoton renversita pro la subita riveraltiĝo. Feliĉe ni perdis nur bananojn, maniokon, papajojn kaj aliajn fruktojn, kiujn ni aĉetis survoje kaj per kiuj la fiŝoj eble sin bone regalis.

Miajn malmultajn personajn havaĵojn mi ne perdis, ĉar mi ilin kunportis por la tranoktado, kiel kutime; koncerne la remiston, li nur posedis zonoveston.

Survoje mi flegis, inter aliaj, kompatindan virinon, kiu multe suferis pro dolora herpeto en la kapo, kolo kaj dorso.

Per kontraŭinflama kaj sentoksiga kuracado mi baldaŭ mildigis ŝiajn suferojn kaj ni revenis al Istmina benataj de tiuj senhelpaj malfeliĉuloj.

Ju pli da fojoj, des pli da anoj! Transjara kurso en Kameoka prosperas

La jaro 1965 estis ankaŭ la jaro de la lingvo internacia, kaj por la japanaj esperantistoj ĝi estis aparta jaro, ĉar en ĝi okazis la 50a Universala Kongreso de Esperanto; sed oni ne opiniu ke post la evento jam falas la entuziasmo por plie agadi en la kampo sufiĉe plugita.

Simile al la antaŭaj kursoj en Kameoka, ankaŭ la Vintra Kurso de Esperanto, aranĝita samloke en la Oomoto-Domo, de la 30a de decembro '65 ĝis la 3a de januaro '66, altiris 114 gejunulojn-oomotanojn inkluzive de pluraj ne-oomotanoj. La kurso enhavis 3 elementajn kaj 2 daŭrigajn klasojn krom unu seminario, kiu lasta estis gvidata de s-ino M. Haudebine, dum la unuajn prizorgis kiel gvidantoj, anoj de la Eksterlanda Fako de Oomoto-Centro kaj f-ino E. Parson, angla samideanino.

En la Seminario partoprenis kursanoj de unu el la elementaj klasoj kiel "kobajoj" por ke la seminarianoj povu per ili iom praktiki la Ĉe-Metodon, kiun antaŭ la anoj edife kaj efike primontris la lerta adepto de la fama metodo, s-ino *Odbin*.

La seminarianoj konsistis el kelkaj diplomitoj de la Esperanto-Propaganda Asocio. Ili ekkonis la metodon por la unua fojo, tial oni ne povus postuli, ke pere de ili la efika metodo rapide disvastiĝu en Japanujo; ni tamen estas konvinkitaj, ke la seminario kaŭzis ĉe la partoprenintoj ion novan por iel profiti en la estonta agado.

Estis kelkaj paroloj koncerne Esperanton en la programo; ekz-e s-ro J. Umeda inicis la ĉeestantojn pri la "ABC de la vojaĝo eksterlanden" instige kaj stimule por la junaj oomotanoj, ĉar la Junulara Fako de Oomoto delegos ĉiusomere po du el la junaj geesperantistoj oomotanaj, laŭ projekto lanĉita unuafoje por realigi la entreprenon en la venonta somero. Tiam espereble du feliĉaj reprezentantoj tiucele elektitaj veturos por partopreni la 51an Universalan Kongreson de Esperanto en Budapeŝto, Hungarujo.

Post la ekzamenoj jenaj du junaj sinjoroj estis nomitaj respektive kiel "Loka gvidanto de Esperanto-Propaganda Asocio," nome s-ro Kacusuke Ikaŭa (el Takamacu) kaj s-ro Masaru Ŝintani (el Ŝimonoseki).

Oni montris novan filmon, kiu en belaj koloroj prezentis al la spektantoj parton de la Inaŭguro de la UK en Tokio, kaj ĉefe la memor-

AKADEMIO DE ESPERANTO

Komunikaĵo de la Prezidanto

Je la komenciĝo de la tria jaro de mia prezidanteco mi opinias utila doni al la publiko, responde al pluraj diverslokaj deziresprimoj, mallongajn informojn pri la nuna agado de la Akademio.

La unua jaro (1963-1964) estis dediĉita al la revizio de la Statuto, al la interna reorganizo kaj al provoj starigi en la akademianaro pli justan reprezentadon de la diversaj lingvofamilioj.

En la dua jaro (1964-1965) la Akademio esploris du ĉefajn demandojn, kiuj jam de longe atendis ian solvon, tiun pri la uzado de la pasivaj participoj kaj tiun pri la gramatika kategorieco de la radikoj; pri ambaŭ estis jam atingitaj decidoj: pri la unua demando la plimulto de la Akademio konstatis, ke la ekzemploj entenataj en la "Fundamento" ne povas esti klarigataj laŭ la tiel nomata "nete tempa sistemo" sen arbitra perforto de ilia senco; pri la dua demando, la plimulto konstatis, ke la Esperantaj radikoj havas unu gramatikan karakteron kaj ke la analizo de De Saussure, kompletigita de Wüster kaj de Kalocsay, respondas al la realaĵoj de la lingvo.

La koncernaj Sekcioj (pri Gramatiko unuflanke, kaj pri la Komuna Vortaro aliflanke) nun prilaboras la tekston de la definitivaj rezolucioj pri tiuj du demandoj. La ceteraj Sekcioj, pri la Teknika Vortaro, la Bibliografio, la Prononcado kaj la Literaturo pretigas nun raportojn pri temoj poste esplorotaj de la Akademio.

Vitry, la 8-an de Novembro 1965
La Prezidanto, *G. Waringhien.*

indajn kaj emociajn scenojn de la Oomoto-Internacia Festivalo. La filmo estis farita de la Enlanda Fako de Oomoto kaj ĝi parolas en la japana lingvo krom fragmentaj vortoj en Esperanto parolataj de la personoj filmitaj en la verko.

Distraĵoj, personaj konversacioj, etoso de la Nova Jaro, fervoro de la junaj esperantistoj, jen kiuj, kune kun la ceteraj eroj de la tuta programo de la jam regula kurso, evidente klinis novajn lernantojn por esperantistiĝo kaj progresintojn por plia perfektigo de la lingvopraktiko. Ni diru, ke la kurso en modesta skalo siamaniere kronis la jaron de la Internacia Kunlaborado, samtempe aŭrorante la pluan progreson de la esperantismo en la nova jaro.

ANONCO

Nekatolikoj povas senpage ricevi la dumonatan revuon "VOJO VERO VIVO" kun informoj pri la katolika religio. Skribu klare viajn nomon kaj adreson al la Sekretariejo de la "Internacia Katolika Informejo", Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

OOMOTO, N-ro 307-308 (1-2月号) 昭和41年2月1日発行・購読料一年300円
編集人中村陽宇・京都府亀岡市・株式会社天声社発行・振替京都25757番